VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161
Cena – dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. kultury 47/87-403/16

Numero 1 Januaro 1991 Leden Číslo 1

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

PACAJ AFORISMOJ

Tiu ne estas la plej granda heroo, kiu batita rebatas (Hálek)

Radiko de malbono estas nekoneco la afero (Hartmann)

Homoj de tuta Eŭropo paŝis kiel brutaro en buĉejon, kie ilin gvidis apud buĉistoj – imperiestroj, reĝoj, prezidentoj kaj aliaj potenculoj kaj militestroj – pastroj de ĉiuj religiaj, benante ilin kaj lasante ilin false ĵuri. (Hašek)

Leĝa rezisto estas la plej bona ilo por defendi de libereco kontraŭ la pli granda potenco, por subteno de la kuraĝspirito de la nacio. La leĝa rezisto estas unua kaj neevitebla paŝo por atigno de vera libereco. (Havlíček Borovský)

Mi opinias, ke ĉiuj, kiuj monprofitas pro la milito kaj kiuj helpas komenci ĝin, devus esti jam la unuan tagon de militaj agadoj starigitaj al la muro pere de reprezentantoj de honestaj civitanoj de ilia ŝtato, kiujn ili sendas en la militon. La aŭtoro kun plezuro akceptus rolon pafmortigi ilin, se li ricevus rajton de tiuj, kiuj estas senditaj en la militon. (Hemingway)

MÍROVÉ AFORISMY

Ten není rekem největším, který udeřen, zas udeří (Hálek)

Kořenem zla je neznalost věci (Hartmann)

Lidé šli v celé Evropě na jatka jako dobytek, kam je vedli vedle řezníků-císařů, králů, prezidentů a jiných potentátů a vojevůdců – kněží všech vyznání, žehnající jim a dávající jim falešně přísahat. (Hašek)

Zákonný odpor je nejlepší prostředek k hájení svobod proti větší moci, k povzbuzování zmužilého ducha v národě, zákonný odpor je první a nevyhnutelný stupeň k dosažení pravé svobody. (Havlíček Borovský)

Myslím, že všichni, kdo na válce vydělávají a kdo ji pomáhají rozpoutat, by měli být hned první den válečných akcí postaveni ke zdi pověřenými představiteli čestných občanů své země, které posílají co války. Autor by s radostí přijal úkol je zastřelit, kdyby dostal zplnomocnění těch, kdo jsou do boje posíláni. (Hemingway)

76-a Universala Kongreso de Esperanto: 27-a julio – 3-a aŭgusto 1991 en Bergen-o Norvegio

Oni povas profeti, ke la Universala Kongreso en Bergen-o estos io speciala. Estas tie ĉiuj kondiĉoj por kredi tiom: la urbo mem estas unike bela, sur mildaj fjordo-deklivoj (svazích) kaj mont/etoj, kun lago meze, amaso da verd/aĵo, riĉa historio kaj rava ĉirkaŭaĵo. La kongres/ejo estas impona, moderna arkitektura verko, bela taj taŭga, situita en la urbocentro, kun pluraj hoteloj proksime. La LKK (=loka kongresa komitato ne estas multnombra, tamen kapabla kaj agema. La jam preparata kongresa programo aspektas riĉe kaj promes/plene. Se vi aliĝos al la Kongreso, vei certe ne bedaŭros tion. Memoru ankaŭ, ke vi ne devos ŝviti (potit se) en subtropika klimato, sed povos ĝui (užívat) freŝan aeron, purajn kaj viglajn (čilé) stratojn de mezgranda urbo, kie oni facile hejm/iĝas. Norvegio estas en Skandinavio, najbare (v sousedství) al kelkaj aliaj landoj kun interesa kulturo kaj vigla Esperanto-movado (hnutí). Vi spertos (zakusíte) interesajn kunvenojn, kaj ĝuos belajn koncertojn kaj teatrajn spektaklojn (představení) en la komforta Grieg-hvagos, nia ĉi-foja (tentokrát) kongresejo. Tiu centro nomiĝas laŭ la mondfama komponisto Eduard Grieg, kiu naskiĝis kaj vivis en Bergeno. Vi ĝuos ankaŭ pli intimajn kunestadojn (přítomnost) dum la kulturaj programoj en la Studenta Centro; vi dancos bale, bankedos, amikos internacie, aŭdos klerajn (osvětové) prelegojn, ĉeestos (budete přítomni aŭ mem partoprenos viglajn diskutojn, bloudit) tra la urbo, ekskursos en ĝian ĉirkaŭaĵon … Norvegio estas lando kun granda kulturo. Pecojn el tiu heredaĵo (dědictví) vi povos ĝui dum la nacia vespero, kie oni prezentos norvegan muzikon, fragmenton el la versa dramo Peer Gynt (ĉefverko de Ibsen) en Esperanto, la faman Hardagner-violinon, norvegan folkloran dancadon kaj aliajn erojn. (Nacia vespero estas konstanta kongres/ero, dum kiu la gastiganta lando prezentas sian nacian kulturon). En la muzika lernejo, tuj apud la kongresejo, ni uzos plurajn salonetojn por fakaj kunvenoj, sed tie la artistoj povos ankaŭ senĝene provludi (nerušeně zkoušet). La Studenta centro, kie oni luos plurajn mezgrandajn ĉambrojn, estas nur en 5-minuta promendistanco. Troviĝos tie ankaŭ vasta restoracio. BERGENo, la ĉefurbo de la fjordoj, kvankam malnova kun riĉa historio, impresas moderne. Kun iom, pli ol 200000 loĝantoj, ĝi restas intima kaj promene (na procházky) esplor/ebla. Tamen, ankaŭ nun ĝi estas la plej grava loko de la okcidenta marbordo de Norvegio, pro varma golfo havanta klimaton de norvega sudo. Ĝi estas komerca urbo, ŝip/trafika haveno, kultura centro, malfermita al ĉiuj kontinentoj, kio faras la vivstilon kaj mondkoncepton de bergenanoj tre internaciaj, konvenaj por etoso de esperanto Uko. Ĉirkaŭe troviĝas rara beleco de norvega naturo marborda: fjordoj, riveroj, montoj kaj valoj. En la valoj floras fruktarboj, dum la neĝa blanko ornamas montpintojn. Rara vidaĵo! Norvegio estas varia kaj bela laŭ naturo: oni povas sperti ĉiujn kvar jarsezonojn en tiu lando samtempe. Ĝi estas interesa lingva, ĉar nur specialistoj konscias, ke la lando fakte estas dulingva, pli pro la du variantoj de la norvega, ol pro la fakto, ke en la nordo de la lando loĝas ankaŭ iom da laponoj.

Mia esperanta libertempo en Svedio - aŭgusto 1990.

La trian de aŭgusto mi kun mia filino Mirka forveturis (odjeli) el Pardubice al Berlino, kie atendis nin mia esperanta konato (známý) kaj dediĉis al ni preskaŭ la tutan tagon. Ni per lia aŭto traveturis eĉ iom de okcidenta parto de Berlino, promenis ĉirkaŭ la likvidata muro kaj malfrue vespere li akompanis nin al la stacidomo por veturi al Malmö. El Sasnitz per grandega ŝipo, en kiu estis kvar longaj trajnoj (vlaky) kaj preskaŭ 200 aŭtoj, ni atingis Trelleborg, poste Malmö. Ŝanĝinte vagonaron ni bone venis al Alvesta, kie atendis nin nia sveda amiko kun pola esperantistino. Per lia aŭto ni vojaĝis preskaŭ 200 km por atingi celan lokon proksime de Blomstermala, kiu estas jam proksime de la maro. Tie ni dum 5 tagoj partoprenis en pedagogia seminario ICEM pri Freinet-metodo pedagogia. Krom prelegoj estis multe da diversaj ekskursoj. Rigardu samtempe la svedan mapon. Ni vizitis la urbon Kalmar tra longega ponto. Ni traveturis la tutan duonon de la insulo Öland, ĝian sudan parton, kie estas multe da interesaĵoj: ventmueliloj (kiuj en Nederlando estas pli belaj kaj pli komfortaj), foiroj (trhy), ceramikaj laborejoj, naturrezervejo, loko de ĉesado (honitba) de la sveda reĝo, lumturo Longa Jano, fortikaĵo, tomboj de virinaj Vikingoj. Plue ni vizitis privatan farmon de 45 hektaroj, kiun prizorgas nur du personoj – geedzoj. Tie estas 45 bovinoj. Plue ni vizitis fabrikon de vitroproduktado, muzeojn, katedralojn, burgojn, patrinlernejon antaŭedukan, bazan vilaĝan lernejon, kiu estis tro interesa. La direktorino poste invitis nin al sia vilao. Ni sidis en ŝia ĝardeno, trinkante kafon kun dolĉaĵoj. Ni vizitis muzeon de estinta gastejo el 17a jarcento. Post fino de la seminario ni forveturis per aŭto de nia sveda amiko norden proksime de la maro tra Oskarhamn, Västervik ĝis al Stockholmo, kie ni trarigardis malnovan urbon, reĝan palacon, urbodomon, stockholman esperantistan asocion, ĝardenon de eminenta skulptisto (sochař) Carlo Milles. Ni rigardis urbon de 155m alta turo, kiu estas la plej alta turo en la tuta Skandinavio (Eŭromast estas pli alta). En suba parto de turo ni admiris holografian ekspozicion, ege interesan. Plue ni partoprenis en tuttaga ekskurso al finlanda insulo Aland, kiu situas duondistance inter Svedio kaj Finlando. Nia sesmembra grupo de esperantistoj estis gaja kaj ni trarigardis
dekunu-eta-ĝan ŝipegon, per kiu ni vojaĝis de la oka matene ĝis la oka vespere kun unuhora paŭzo, dum kiu ni vizitis la finlandan urbon Mariahamn. Dum revena vojo en la giganta ŝipego ni manĝis – okazis akceptregaleto, kiu laŭ Svedoj estas multe pli malmultekosta ol en normala sveda restoracio. Ni gustumis multajn svedajn manĝaĵojn. Ni dum la tuta vojaĝo havis belegan eĉ varman veteron kaj mi estas feliĉa, ke eĉ mia sanstato la tutan penon bone eltenis. (Jarmila Rýznarová, Pardubice).

Verda familio deziras al siaj legantoj FELIĈON KAJ SANON en la Nova jaro 1991!

Terminologia Esperanto-Centro de UEAp.k.499 41000 Zagreb, Jugoslavio. Se vi okupiĝas pri faka terminologio de via fako, kaj volas kunlabori en propagando de uzado de faka esperanto, skribu al citita adreso, kie vi trovos konsilon por kunlaboro kaj adresojn de viaj samfakuloj.

Dro Ĉaba Bige – Ladislau Gagyi: „Copsa Mica, infero (peklo) en la koro de lando.“ - ĵurnalo Timisoara (Rumanio) 1990-109,p.3. - En Rumanio distrikto Sibiu, ĉe la rivero Tirnava Mare, estas unu el la plej poluitaj (znečistěných) urboj en Eŭropo: Copsa Mica. La aero, tero kaj akvo estas poluitaj per fulgo (saze), plumbo, oksido de zinko, dioksido de sulfo, kadmio, stibio k.s. (kaj similaj). Ĉi tie la plantoj, arboj, vizaĵoj, vestaĵoj de homoj, eĉ lano de ŝafoj, estas nigraj de fulgo. La personoj, kiuj vivas ĉi tie, estas grave atakitaj de ĉi tiuj substancoj. Jare malsaniĝas 120-140 homoj pro toksiĝo per plumbo; mezaĝo estas pli mallonga je 9-10 jaroj kaj kazoj de denaskaj (vrozené) afekcioj pli nombraj ol en la aliaj teritorioj de la lando. Eĉ la naturo suferas grave pro poluo: la arboj estas nudaj, ĉar folioj mortis jam en burĝonoj. Solvo (vyřešením) estus transloĝigo la loĝantojn kaj limiti la labortempon.

Laco de esperantistoj. Ni, esperantistoj, estas stranga „popolo“. Iu facile, iu malfacile maturiĝas kaj post certa tempo atingas sufiĉe bonan lingvonivelon kaj kapablas eĉ legi, aŭ skribi, paroli sen vortaro. Sekvas evoluperiodo, kiam la esperantisto fervore skribas al geamikoj kaj legas diversajn esperantajn gazetojn alportantaj diversajn raportojn pri esperantaj renkontiĝoj, laborplanoj, movadaj okazaĵoj. Tiu monotema legado tamen povas diligentan leganton lacigi, kaj ne trovante ion novan en stilo de esperanta gazetaro, intereso de la leganto pri la lingvo velkas. Iom post iom, en kirlo de ĉiutagaj zorgoj, nia fervora esperantisto estiĝas „verda kadavro“. Sola helpo estas freŝigi nian movadan preson per „normalaj“ interesaj raportoj nemovadaj kaj nur parton de la gazeto lasi por movadaj sciigoj. Tia gazeto estas nur MONATO, tiom ŝatata de esperantistoj, tamen pro sia prezo neatingebla. Nun la kondiĉoj ŝanĝiĝas – en proksima estonteco ni atendas malaperon de multaj malgrandaj esperantaj bultenoj, tamen oni atendas liberan eblon de abonado de ĉiuj gazetoj post egaligo de nia krono.

Únava esperantistů. My, esperantisté jsme zvláštním „lidem“. Někdo snadno, někdo nesnadno zraje a po nějakém čase dosahuje dosti dobrou jazykovou úroveň a může i číst, nebo psát, mluvit bez slovníku. Následuje vývojové období, kdy esperantista píše přátelům a čte různé esperantské časopisy, přinášející různé zprávy o esperantských setkáních, plánech, událostech z hnutí. Toto čtení jednoho tématu však může pilného čtenáře unavit a nenacházeje nic nového ve stylu esperantských časopisů, zájem čtenáře o jazyk vadne. Postupně ve víru každodenních starostí náš horlivý esperantista stává se „zelenou mrtvolou“. Jedinou pomocí je osvěžit tisk našeho hnutí „normálními“, zajímavými reportážemi mimo hnutí a jen část časopisu nechat zprávami z hnutí. Takovým časopisem je jen MONATO, tolik oblíbený mezi esperantisty, avšak pro svou cenu nedostupný. Nyní se podmínky mění – v brzku očekáváme, že mnoho malých esperantských časopisů zajde, avšak očekává se možnost objednávání všech časopisů po vyrovnání naší koruny.

Eble ni ĝisvivos eldonon de aliaj gazetoj, kiuj esprimus diversajn opiniojn kaj ideojn, tamen esperantajn, facile kompreneblajn al ĉiuj legantoj, buntigitaj per krucenigmoj, ŝercoj, desegnaĵoj, sportaj raportoj, anoncoj.

Snad se dožijeme vydání jiných časopisů, které by vyjadřovaly různá mínění a nápady, avšak esperantské, snadno srozumitelné všem čtenářům, zpestřené křížovkami, anekdotami, kresbami, sportovními zprávami, inserty.

Kelkaj finlernintoj de korespondaj kursoj: (absolventi)

Auská Květa
PedDr Iva Matulková
Houdová Věra
Macháčková Marie
Mrázek Martin
Cirga Jiří
Vaňková Lenka

Ni gratulas la finlernintojn kaj deziras al ili plenan aplikadon de nia Internacia Lingvo en ilia vivo kaj multajn pormovadajn sukcesojn! Ni esperas, ke ili trovos sian lokon en aktiveco de iliaj lokaj esperantaj kluboj.

Lepruloj (malomocní) en Rumanio. (Sennaciulo 6/1990). Verŝajne (Pravděpodobně) la lasta kolonio de lepruloj en Eŭropo estis malkovrita (objevena) en la vilaĝo Tichileste. Tiun kolonio malkovris belgaj transportistoj de helpmaterialo. Tiu ĉi loko ne troviĝas sur la geografia mapo. El kvindeko da malsanuloj, kelkaj estas ĉi tie naskitaj kaj ili ankaŭ ĉi tie mortos. Pro la malsano pluraj (mnozí) el ili estas tute difektitaj, blindaj, sen nazo, kun senfingraj manoj aŭ piedoj (bez prstů). La kolonio de lepruloj estiĝis (ustanovila se) en Ticheleste en la jaro 1877, 50 km de la urbo Tulceae apud Nigra Maro. La lepruloj produktas legomojn (zeleniny) kaj iom da kokidoj (kuřat), ĉar per tio, kion la ŝtato donis al ili, ili certe malsatmortus (zemřeli by hladem. La medikamentojn, kiuj almenaŭ haltigus (zadržely) la daŭran evoluon de la lepro, ili ne ricevadis. Ceausescu tute forlasis (opustil) la leprulojn. La plej aĝa inter ili estas 60-jara (naskiĝinta in Tichileste) kaj la plej juna 23-jara. Laŭ doktor G. Popa, en Rumanio troviĝas ankoraŭ kelkaj dekoj la lepruloj. La eksreĝimo (bývalý r.) de Ĉeausescu ĉiam kaŝis (skrýval) ekziston de tiu leprula vilaĝo, same kiel ĝi ĉiam asertis (ujišťoval), ke ne ekzistas aideso (AIDS) en Rumanio. Poste montriĝis, ke aideso infektis multajn infanojn, ĉefe en malsanulejoj kaj orfejoj (sirotčincích).

El soveta humuro: El ĵurnalo: Militinformo: „Hodiaŭ en la iran-iraka fronto estis mortigitaj 150 sovetiaj, 120 ĉinaj, 100 usonaj (amerických), 90 franciaj kaj 80 angliaj soldatoj, kaj krome unu irana soldato. Li plene tion meritis (zasloužil si to), ĉar oni ne devas (nesmí se) enmiksiĝi en alies (cizích) aferoj.

Pipo: Foje Stalin perdis sian pipon (dýmku). Li tuj telefonis al Berija: Berija, mia pipo perdiĝis.“ Post iom da tempo li trovis la pipon kaj denove (opět) telefonis al Berija: „Berija, la pipo estis trovita“. Sed Berija respondis: „Tro malfrue! Ses teroristoj jam konfesis! (už se přiznali)“

La VIa (eksterordinara) kongreso de la Ĉeĥa Esperanto Asocio en Třebíč okazis 30.XI.-2.XII.90, elstare organizita de anoj de forta klubo kun longa tradicio (ĉijare /letos/ ili organizas la 45an (!!) Someran Esperantan Tendaron en Lanĉov ĉe valbaraĵo (přehrada) apud Vranov). Ili sendifekte organizis ankaŭ la kulturajn ĝuaĵojn (požitky): folkolora danc-kaj kantensemblo Třebíčan, infana ensemblo Sluníčko, Miroslav Smyčka (baryton, Ŝtata opero Ústí) akompanata de pianisto Jiří Vychodil, kaj dancmuziko dirigita de Petr Gros. Jam la vendreda vespero estis promesplena per sia amika etoso, tamen la ĉefa karakterizo estis labora, ĉar oni devis solvi (rozřešit) multajn gravajn problemojn kaj elekti novan komitaton. Ĉeestis pli ol 200 gesamideanoj, inter ili 91 delegitoj de kluboj kaj sekcioj. Voĉdonis 79 delegitoj. Unuopaj kandidatoj ricevis voĉojn (procentojn) – laŭ aboco (alfabeto): Ing Dvořák 64 (81%), Filipová 31 (38), Hasala 50 (63), Holeček 7 (9), Ing Chrdle 71 (90%, Ing Vl.Kočvara 63 (79), Ing Pluhař 64 (80), Podhradská 65 (82), Polnický 63 (79), Ryšánek 41 (52), Severa 24 (30); kelkiuj estis alskribitaj (Sváček, Malovec, Cink, Dr.Barandovská). La voĉdonado atestis pri informiteco de la voĉdonantoj. Estis elektita sepmembra konsilantaro, kiun en noktaj horoj dum unua kunveno fiksis la funkciojn: prezidanto Ing Chrdle, du vicprezidantoj (Pavel Polnický el Poděbrady kaj Ing Dvořák el Prago) kaj anoj de konsilantaro (Vl.Hasala, Ing Vl. Kočvara, Ing Pluhař, Věra Podhradská). Ĉiu havas sian konstantan taskon kaj zorgon pri certaj sekcioj kaj agado.
Novaĵoj: La Uko 1992 okaze la datreveno de Komenio estas necerta. UEA postulas kunlaboron kun la plej granda vojaĝoficejo. Estas malbonaj financaj spertoj kun ĈEDOK, pro tio ni proponas junularan CKM. Plue UEA postulas aŭspiciadon (zaštítění) de altranga persono (kutime ŝtatestro aŭ registrara estro, kaj ni proponas Věra Čáslavská) kaj ĉefe financa garanton, kiu estas en nia ekonomia stato problema. Se ni ne interkosentos kun UEA pri Universala kongreso 92 en Prago, proponiĝis nove unuiĝinta Berlino (ne Hispanoj kiel origine) kaj al Prago restus nur t.n. (tiel nomita) Postkongreso, ne tiom reprezenta, tamen loga. La financa stato de nia asocio estas tre malfavora (nuraj 21000 Kčs en banko), tamen estas grandaj stokoj da presaĵoj (mendu liston!). La nombro da ordinaraj membroj estas plej alta (2660) krome ankoraŭ 600 ne pagis (kelkaj pardonpetis pro malbona financa stato-rentistoj). Estas 450 dumvivaj membroj, kiuj ne plu pagas. Helpu al ĈEA per dumviva membriĝo! La planita unuiĝinta ĉs-gazeto Perspektivo ne realiĝos. STARTOn redaktos Miroslav Malovec el Brno. Pro eblo de freŝdata (čerstvé) informiteco ĉiu (precipe individuaj membroj) havas eblon aboni de ĈEA „Informatoron“ – 30 Kčs jare. Ĉijaraj korespondaj kurson alportis por nia asocia kaso nur 50000 Kčs. Ni nun vivas en ombro de intereso pri la angla, kiu alportas tujajn (okamžité) materialajn kaj ekzistencajn avantaĵojn. Lu-elspezo (nájemné) por sekretariejo triobliĝis, same poŝtelspezoj, papero. Kiel injekto de bonhumuro sonis la vortoj de la reprezentanto de slovaka asocio Ed.Tvarožek, kiu „alportis saluton el depost tiu streketo – spoza tej ĉiarky“ kaj proklamis, ke esperantistoj estas neneniigeblaj (nezničitelní), ĉar ni transvivis Hitler-on, Stalinon kaj ni transvivos ankaŭ Klauson! En diskuto Dro Hradil rememoris, ke nia ministerio de lernejaferoj kvankam ne allasis Esperanton kiel nedevigan instruobjekton, tamen rekomendis kiel eksterdevan interesobjektan instruadon. Ni havas multajn novajn instruistojn kiuj faris sukcese ekzamenon kaj ne trovas eblon instrui. Ili estas petataj anonci konvenajn lernejojn, tamen ne memstare trakti – la asocio (pedag.sekcio) proponos ilin al la direktoroj. Skribu al ĈEA ped.sekcio!

Kion ni aŭdis en Třebíč ? De la tribuno estis aŭdeblaj interesaj sciigoj kaj diskutaj kontribuaĵoj (příspěvky). - Ni ne volas altigi la membrokotizojn, sed ni volas grandigi la enspezo per entreprena (podnikáním) agado de la asocio kaj de la sekcioj, kiu nun havas juran subjektivecon (právní s.). Memstara financado vigligos la agadon de la sekcioj. - De la Va kongreso en Havířov kreskis la membra bazo (základna) de 2160 al 2664. - Vi povas mendi pluajn STARTOjn (a` 6 Kčs) por viaj eksterlandaj amikoj. - Junulara sekcio peras kromdevizajn kontaktojn kaj vojaĝojn eksterlanden. Ĝi ankaŭ eldonas tre interesan cirkuleron 6x jare. - Partoprenu (účastněte se) en la seminario de la junulara sekcio. - Komisiono por preso kaj informoj: nun gvidata de s-anino Rousková. Ĝi havas jam sukcesojn (ekz. informoj pri Eo en elsendaĵo Meteor, kiu estas tre populara). La gvidantino petas interesulojn pri aniĝo en la komisionon kaj ankaŭ sendi eltondaĵojn (výstřižky) el lokaj gazetoj pri la agado de niaj kluboj. - Turista komisiono: gvidadon transprenis post inĝ.Bramberger Květa Hubnová. Ŝi sendos al vi jarplanon de agadoj. Kunlaboro kun pola Esperantotur sukcesis precipe en Slovakio (SEA). Abunda plano havebla ĉe Esperantotur-Grzembowski-Bydgoszcz. - Infana sekcio (gvid.Malovec) komencas agadon. Ĝi enhavas ankaŭ agadon „Geonkloj esp.“. Ideo, longjare sukcese eksterlande aplikata: Matura esperantisto invitas kaj protektas junan komencantojn, zorgas pri lia lingva kvalito. Eblo de malmultekostaj eksterlandaj vizitoj. - Kooperativa (družstevní) sekcio gvidata de s-ano inĝ.Havlík Frant. Hodonín: sukcese realigis kelkajn renkontojn de kooperativanoj precipe al Hungario. Veteranoj (ĉu pli bone Konsilantaro de pliaĝuloj) gvid. ĉefdelegito UEA Linhart Rýznar, Pardubice: bedaŭrinde malgranda intereso pri la agado. La kunvenoj kaj kunaj ekskursoj garantius kvalitan perbuŝan konversacion sen krokodilado (užívání češtiny) tiom aŭdebla ĉe ĉiuj esp.renkontiĝoj. - Invalidoj: havas 145 membrojn, estro inĝ.Ŝpaček, motoro de la sekcio duopo Vaněček-Malínská el Slaný, kiuj redaktas tre valoran cirkuleron ĉiumonatan kun freŝdataj informoj. Finstudis ĉe la sekcio 230 lernantoj, 360 progresas en la studado. Ili kolektos 5.821 okulvitrojn por Afriko, fordonis (kolektis) 14.600 Kčs por Armenio! - Katolikoj promesplene ekativiĝis. En la konferenco en Česká Třebová partoprenis 70 anoj de IKUE. - Ekumena sekcio preparas tendaron kun kristana temaro (tematika). - Evangelia sekcio: pere de prof. Dro Horský kolektis kaj forsendis al Afriko (agado E3 Tuinder) 100000 okulvitrojn! Kelkaj samideanoj seniluziĝis pro neunuiĝo de la esp.kristana movado. Ĉu kaŭzo rituala? (sankta meso). - Literatura sekcio: estro poeto Jiří Karen pro sanstato ne plu gvidas. Konvena interesulo estas serĉata. Grave estas propagandi nian literaturon pere ĉe Eo eksterlanden. - Sekcio naturprotektantoj: preparas denove tendaron laboran pro savo de Jeseníky. Informoj s-ano Droppa el Šumperk. Arbaraj laboroj 8-14.VII.91. - Kolektantoj: gvid.Vláďa Hasala – efektiviĝis 3 renkontiĝoj en Strážnice. Ŝakistoj: ĉiujare turneo en Poděbrady. Ĉijare Olimpiado. - Scienceteknika sekcio gvidata de Inĝ Pluhař. Terminologia laboro kvankam publikota nur post la fino de terminaro, sukcese progresas. - Sanitara sekcio sukcesis regule eldoni gazeton SANO, kiu estas unu el malmultaj presaĵoj interŝanĝeblaj por eksterlandanoj. Abonu ĝin! Popularsciencaj aktualaĵoj interesas precipe pli maljunajn esp-istojn, kiuj zorgas pri sia sanstato. - Fervojistoj: sukcesis presigi esperantan tekston en la tutŝtata nia horaro. Atentigu pri tio la publikon. - Universala Esperanto Asocio: La ĉefdelegito Linhart Rýznar informas pri eblo aboni gazeton Eo kaj jarlibron kaj aniĝi kiel individua membro, post 2 jaroj delegito de UEA – jare 270 Kčs. La plej freŝaj informoj pri la monda esperanto-movado.

Liberigo nur post la novembraj okazaĵoj! Eluzu! - S-ano Jičínský, estro de la klubo el Třebíč, prezentis saluton de la loka klubano 99-jara s-ano Cibur, psike tute vigla! Surprizo estis salutprezentado de sinjoro Soukup, reprezentanto de Transnacia radikala partio. Ĝi ekestiĝis en 1949 kaj multe uzas por siaj internaciaj kontaktoj. Ĝi propagandas senperfortajn principojn de Gandhi. En Italio ĝi havas grandan influon kaj 10% da ili estas esperantistoj. Internacia prezidanto estas Marco Panela. - Pedagogia sekcio transprenis ankaŭ la taskon de la ekzamena komisiono (Dr Barandovská). - Dro Tůma diskutis interese pri propagando de Eo. La angla lingvo postulas de lingve talentitaj homoj minimume 6200 instruhorojn, t.e. unu tutan laborjaron, tamen Eo nur 200. Plua grava argumento estas absoluta klareco de la elparolo (ĉion oni legas tiel, kiel oni skribas). La estonteco de nia sukceso bazas en kvar graduj: unue ni devas fari nian lingvon teknike kapabla (fino de terminaroj). 2. poste la mondo agnoskos profitdonecon. 3.a grado venos post iom post ioma (postupné) automata – neceso. 4. Finan venkon post disvatigo alportos post ĝia rezulta rekono: Kiu volos penetri en la mondon, nepre bezonos uzi Eon. Grandan subtenon ni povas atendi de la minoritataj nacioj. Antipatio de lingvosciencistoj fontas el sento de ilia ekzista priminaco (ohrožení). En la nove preparata vortaro estu ankaŭ reciproka ĉeĥa gramatiko en Eo, kiu faros la vortaron uzata ankaŭ por bohemistoj eksterlandaj, eĉ por ĝenerala publiko, kiu interesiĝas pri studo de nia ĉeĥa lingvo. Hasala supozas, ke unu el kaŭzoj de la sukceso de la klubo en Strážnice estis, ke la klubo ĉiam sur unuan lokon menciis titolon la protektanto (zřizovatele) de klubo, kiu poste povis facile fieriĝi per agado de sia instituto – precipe eksterlandaj mencioj estis citataj. - Ing. Bloudek atentigis pri revigligo de kontaktoj kun germanaj esperantistoj: Ercmontara renkontiĝo okazos ĉijare en Pernink apud Nejdek (CS) 22-27.IX. Aliĝu tuj ĉe la klubo en Karlovy Vary. La klubo nun senpage klubas en lingva lernejo! - Heisler (Havířov) atentigas, ke estas bezonate plibonigi eksternan aspekton de la sekretariejo en Jílská ul. „Skinheads“ defektigis la firmaan tabulon. Bone estus havi modernan kaptilon elektronikan en la montrofenestro. Multaj eksterlandanoj trairas la strateton inter studentfama Perŝtejn kaj malnovurba placo gapante (zevlujíc, prohlížejíc). Ing Chrdle: ni ne povos serĉi pli konvenan lokon por nia sekretariejo. - Stibůrek, Benešov: La klubo preparas paroligan seminarion en Samechov sur Sázava – semajnfino 24-26.V.91 en strukturo de iamaj seminarion en Mnichovo Hradiště. Nur 40 lokoj. - Se vi volas publikigi viajn renkontiĝojn en Esperantotur Bydgoszca kun planita eksterlanda partopreno, vi devas sendi planon ĝis fino de oktobro al B. Konvene estas ankaŭ al nia ĈEA, ev. turisma sekcio. Nur poste vi povos kalkuli kun vasta partopreno. -

Ing Chrdle RNDr Csc: Kiel propagandi Eon? Atentigi pri komerca uzeblo. Propedeŭtika valoro – preparo por studo de fremdaj lingvoj precipe ĉe infanoj. Nepre atentigu pri la du konataj rezolucioj de UNESCO, kiu rekomendas enkonduki Eon en la lernejojn. Oni devas eliri el „esperanta geto“ ne nur ferme klubi, sed atentigi publikon pri nia agado. Tre efika estas uzo de Eo kiel laborlingvo (sukceso ĉe fervojistoj dank` al ĝenerala sciancista rekono de nia prezidanto). - Disdono de la komitatanoj: Ing Dvořák: zorgo pri junularo, anstataŭanto de la prezidanto en oficiejo; sekcio de infanoj; instruado de Eo+ekzamenoj. Pavel Polnický: anstataŭado de la prezidanto; zorgo pri sekcioj turisma, katolika, kristana. - Ing Pluhař Zdeněk: gvidado de la sekretariejo; edicia komisiono; sekcioj: scienc-teknika, sanitara, reprezentanto por ĉeĥo-slovaka esperanta komitato. -

Vláďa Hasala: sekcioj kooperativa, kolektantoj, natuprotektantoj, ŝakistoj. - Ing Vladimír Kočvara: sekcioj de veteranoj, invalidoj, literatura, ĉeĥo-slovaka komitato, respondeco por preparo de Universala kongreso 1992 en Prago. Věra Podhradská: protokoloj de kunvenoj, informoj pri la konsilantaro, laborjura aferoj. SET en Lanĉov, mineralogia sekcio, preparoj de ĉiujaraj konferencoj de ĈEA. - Ing Chrdle: ĉio restanta, precipe reprezentanto de ĈEA por eksterlando, komisio por preso kaj informado, fervojista sekcio, tria anstataŭanto en la ĉeĥo-slovaka komitato, kun Polnický respondas pri la IFEF monda fervojista konferenco en Olomouc en 1991. - Kontrolan kaj revizian grupon prezidos Ladislav Bala el Mor.Budějovice, membroj estos Otilia Barešová kaj Jiří Fanta. Antaŭtagmezan dimanĉan programon enkondukis konata, bele prezentita poemo de Rudyar Kipling: „Se …“ laŭtlegita de s-anino Růžičková-Pavlínová Alena, profesorino de AMU el Brno. La poemo per sia karaktero morala kaj insitiga tre konvenis en kadron de hodiaŭo (dnešek). - S-ano Vomáčka Jiří el Plzeň, estro de la klubo kaj redaktoro de Informilo proklamis, ke post kritika artikolo de la bulteno ili ne respondis al la leteroj de legantoj (ĉu protestaj?) kaj proklamis memstarecon de la klubo. Ili ankaŭ ne kapablas trovi solvon por pagi grandan sumon por luo (nájem) de sia klubejo. Al iliaj E-kursoj ili ricevis nenian aliĝanton. La klubo denove planas vizitojn turismajn de la najbaraj ŝtatoj (A kaj FGR). - S-anino Radka Křivánková el Písek tre instige (podnětně) parolis pri nia granda ŝanco – aranĝo de UKo 92 en Prago. Ni atentigu eksterlandon, ke ĝuste Komenský estis unu el la unuaj proponistoj de la internacia lingvo, kiu ankaŭ amplekse priskribis sian proponon latin-similan. Tamen ni ne estas preparataj okaze la UKo prezenti lian tutan verkon al la publiko. Ĝi estas unuavica tasko por niaj tradukistoj. La prepara kiomisiono (Loka kongresa komisiono) devus jam nun eklabori precipe por la kultura kadro de la komisiono. (Inĝ Kočvara, la respondeculo jam elektis siajn kunlaborantojn – rim.de la redaktoro). Květa Hubnová, estro de la turista komisiono proponis disvastigi la ideon kaj reton de la populara Pasporta servo, kiu grave rolas en uzo de Eo per la junularo. - Jiří Laube, Roudnice: instigas pri reala propagando. Li atentigas pri eblecoj en apudalpa kvinopo (Yu, I, A, CS, H), kie Eo povas en turismo kaj kultura interŝanĝo trovi sian gravan lokon. Sufiĉas certigi prizorgon por 45 homoj (loĝadon, manĝadon kulturan programon) – aŭtobusa kvanto, kaj ni povas la saman servon peti de niaj partneroj. Necesas trovi „vojeton de peresonaj kontaktoj.“ Ankaŭ TEC (terminologia esperanto centro), membro de la internacia normiga asocio ISO atendas la helpon de niaj esp.faklaborantoj. Zdeněk Hršel, Brno diris, ke la prezoj de PNS por eksterlanda preso estas por ni neatingeblaj. Pri interŝanĝo de gazetoj zorgu pli grandskale nia asocio (tamen mankas materialo por interŝanĝo-rimarko de la red.). - Smyčka Miroslav, Ústí: ni malfacile paciĝas kun nerealigo de UKo. Se la Uko 90 estis ebla sub Castro, ĝi devas realiĝi ankaŭ sub Havel. - Ing.Kalný Jan, Č.Budějovice: La asocio solvu nur principajn aferojn. Necesas ekagi! E-o ne estas hobio – for la amatorismon! Historia ŝanco: establo de la mezeŭropa universitato – postuli fondon de la interlingvistika katetro kun instruo de Eo kiel egalrajta lingvo, eĉ ĵurnalista fakultato. Drahoš Kočvara, Ostrava, kiel ĉiam flaminstige: savu la asocion. Eldonu lotbiletojn, esp.monbiletojn internaciajn, papermonon kaj monerojn, aranĝu asocian prunton inter membroj. (fino en la estonta numero de VF.)

Frazeologio (Žďárský-Procházka):

E s t i : Myslím, tedy jsem – Mi pensas, do mi estas (ekzistas)

Býti dlužen - ŝuldi
býti s to – povi; esti kapabla
býti naživu - vivi
je tomu pět let – pasis kvin jaroj de post io
Je mi třicet let – mi havas aĝon de tridek jaroj (mi estas tridekjara)
Je mi líto – mi bedaŭras
býti přítomen – ĉeesti, partopreni
býti vhod (líbiti se) - plaĉi
jak je ti? - kiel vi fartas?
býti hladov - malsati
je mi teplo – mi estas varma
je mi zima – mi estas malvarma
Zač je to? - kiom kostas tio?
To je za korunu – tio kostas unu kronon

Překlad slovesa míti: Vlastnictví, držení nějaké věci – havi, posedi: kiu havas monon, regas la mondon.

O citech a pocitech: esti s přídavným jménem: Mi estas prava. Mi estas malsata. Miaj manoj estas malvarmaj.

Významové sloveso: Mi koleras. Mi soifas. Mi konfidas. Mi amas vin. Mi ŝatas rozojn. Mi preferas pacon pli multe ol disputon. Kiel vi fartas? Mi fartas malbone. Mi ne estas tiel potenca. Gardu vin! (měj se na pozoru!). Mi havas ion por diri al vi. Mi opinias (mám zato).

Nerozhodnost a rozvažování: Ĉu mi iru kaj voku amikon? (mám jít a zavolat přítele?). Kion mi faru? (co mám dělat?)

Povinnost: přechodník + příčestí budoucí: Mi estas vizitonta lin. (Mám ho navštívit.) Tiu ĉi afero ne estas plu prokrastota. (Tato záležitost už se nemá odkládat.)

Směti: germanisty bezúspěšně bylo zaváděno: darfi; tento neologismus najdete ve starší literatuře). Rajti (býti oprávněn). Ĉu mi rajtas iri? Demandas la soldato de la oficiro. - Mi havas permeson kanti. Oni povas ĉion postuli de li. Tiu afero ne devas esti (nesmí být) prokrastata. Mi ne devas danci (nesmím tančit).

Musiti: Vi devas zorgi pri tio. Vi ne bezonas timi. (pozor: Mi devas – musím; mi ne devas – nesmím!)

Moci: Vi povas iri – respondas la oficiro al la soldato. Vi rajtas iri. Ĉu la monto estas videbla? Li skribis kiel eble, plej bone. Ne ĉiu, kiu havas rajton, povas. Mi ne estas kulpa pri tio.

Chtíti: míti vůli – voli. Přáti si – deziri. Hodlati – intenci. Se vi volas, vi povas. Se vi deziras, vi povas. Se vi intencas, skribu. Se vi plaĉas al vi, vi skribu.

Státi: Laborante li staras. La libro kostas kvin kronojn. Tio ne valoras la penon. Tio ne estas peninda. Nestojím o to – mi ne ŝatas tion. Hodiny stojí – la horloĝo haltas. Vlak stál na stanici – La vagonaro haltis en la stacidomo. Stojí na tom (trvá na tom), aby – li insistas (je tio), ke … Nestojím o cizí – mi ne avidas fremdan havaĵon. Tio estas vidinda. Stůj co stůj – Nepre…

Dáti: Dal mi knihu – li donis al mi libron. Dám se (nechám se) oholit – mi razigos min. Dej mi pokoj – Lasu min trankvile. Dát do tisku – presigi. Dát najevo – montri, vidigi. Dát se na cestu – ekiri, ekvojaĝi. Dejme tomu – ni supozu. Dát na pamětnou – doni lecionon.

Věděti: (aldone el Plena Ilustrita vortaro). Scii lingvon, sian lecionon. Neniu scias ĉion. Scii legi, kalkuli. Neniu scias lian tombon. La tuta mondo devas scii pri nia kongreso. Ĉu vi scias pri mia filo? Sciu elokventi (být výmluvný), sciu ankaŭ silenti.

K i e l d i r i ? Lentaigne. Praktika esperanta frazeologio. Daŭrigo.

KRIMO: Gangstero ĉassekvata (pronásledovaný), persekutata, arestita. Mankateno (náramkové řetízky). Akuzi iun pri murdo. Ne aŭskultinte ne kondamnu. Zorge esplori la aferon antaŭ ol suspekti iun. Imputi (přisuzovat) al iu krimon. Kulpigi iun pri krimo. Krianta eraro. Invoki (dovolávat se) ateston. Ĝis la fino de la proceso, la akuzito malkonfesis la krimon. Li konsciis (uvědomoval si) sian senkulpecon, sed ne povis ja elmontri (prokázat) sian pravecon. Kredi je ies senkulpeco. La honorindeco de lia filo estis difektita de tiu akuzo. Restiĝis lia honoro. Konfeso de krimo. Krii al venĝo (volat po pomstě). Kap/kosta, mort/merita krimo. Ŝton/um/i (kamenovat). Prezentiĝi por arestiĝo. Kulpo/konscio lin ŝarĝas (tíží). Homo, kies konsciensco estas ŝarĝita de mortigo (vraždou). Pridemandi (vyptávat se) kulpigiton (obviněného). La kulpinto metis ĉion sur oni/an (někoho neurčitého) dorson. La demandoj de la enketisto (vyšetřujícího) estas plenaj de insidoj (úklady). Enketa juĝisto (vyšetřující soudce). Nerefutebla pruvo (nevyvratitelný důkaz). Akumuli pruvojn kontraŭ la akuzito. Pruvi per atestaĵoj de okula atestanto (očitého svědka). Mensoganta (lživý) atestanto. Raporti pri ĉiuj cirkonstancoj (okolnosti). Indigni (rozhořčit se) pro maljusta akuzo. Kaptita ĉe la ĉe la freŝa faro. Malprave, senpruve akuzi. Via senkulpeco ne estas pruvita, do neadebla, neigebla (neprůkazný). Nun lia krimo estas pruvita. Alvoki iun kiel atestanton. Kreindeco (věrohodnost) de atestanto. Fari, mezi ateston. Certeco de atesto. Atesti favore al iu. Elmeti atestojn kontraŭ iu. Falas ĵuro. Depozicio (prohlášení). La atesto kongruas (shoduje se) kun la asertoj de la akuzito. Cirkostancoj eksludantaj (vylučující) kulpecon. Kontroli alibion. Malkovro de nova fakto senkulpigas (zbavuje obvinění) lin. Pridemandi politikan krimulon. Persekuti, torturi (mučit), turmenti, martirigi. Barbaraj turmentoj. Torturoj per akvo, elektro. Draŝi (mlátit), tradraŝi al iu la dorson. Konstati ies kulpecon. Lia kulpeco ne plu estas duba. Deklari ion kulpa. Akto de akuzado. Juĝi pordoferme (za zavřenými dveřmi).

KORESPONDI DEZIRAS: (Mallongiloj- zkratky: bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ= interŝanĝas; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tutmonde.)

Dudek kvar lernantoj el gimnazio el gimnazio kaj konmerca faklernejo en Sarkad, orienta Hungario d kor tm. Bonvolu skribi al la instruisto Georgo Flender, Ady Endre Gimnazium Vasut u.2, H-5720
Olasz Erika, Oprendek 2, H-3562 Onga, 16j junjulino d kor tm ĉt.
Esperanto klubo de York C/O Guppys entreprise club, 17 nunnery lane, Yourk, Britio d eldoni libron de ŝercoj. Bonvolu sendi ŝercojn.
Membroj de Jiangmen-a Esperanto Ligo dez kor kun esp-istoj de tm. Adr: 502/17, Nonglin Xincun, Jiangmen, Guangdong, 52900 c.
Ruhi Olmezi, Pasa Cani sk, Sagir han 40, Mercon-Istanbul, Turkio d kor tm.
Jaŭ Fangmin, 33-j, Lü Xing Yin Shua Chang, 14 Nei Huan Lu, Nanning, Guangxi, Ĉinio 530022, 33 j d kor pri preso, vojaĝo, entrepreno kaj aliaj.
Jurij Marĉenko, Mira, 3-78, Curupinsk, 326520 USSR d kor ĉt.
Wang Jiang, P.O.Box 741, Ruijin, 342509 Jiangxi, Ĉinio, 21j oficistino, tm.
Pentti Tormala, laboras en Naturhistoria muzeo, volas fondi por la loka kaj internacia agado internacian grupon. Adr.: Tuomarinkartano, SF 06100, Porvoo, Finnlando
Esperanto-Klubo de urbo Elec d kor tm ĉt. SU-399740 Lipeckaja obl., u.Elec, str. Koroljova, d.7, kv.71, klubo Esperanto.
Gong Xuesh-eng, Nanzhang baoshe, Hubei, 441500 ĉt, 37-j verkisto, tm ĉt.